

8157V

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

ESPERANTO —
DUA JARCENTO

•

LETERO DE
ZAMENHOF

•

KIAL NE
ESPERANTO?

•

ARDAJ
E-BATALANTOJ

•

CENTJARA
E-POEZIO

•


JUBILEAJ
CELEBRADOJ

•


JUNA
ESPERANTISTO

•

LEVSKI
EN NI MEM...



JARO 56 • N-RO 7 • JULIO • 87



Deklaracio pri esperantismo

(Oficiala teksto de la Bulonja Kongreso — 1905)

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj-representantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu „ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn“, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj du jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiufanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukas al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laboro praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun

lingvon, tial Esperanto estas „nenies propraĵo“, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spirita mastro de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto“. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.





ESPERANTO — JARCENTO DUA!

Prof. Stojan ĜUĜEV,

Nun ni festas la 100-jaran jubileon de Esperanto. Tio estas granda, tre grava dato en la evoluo de nia lingvo, de la tuta E-movado ĝenerale.

Dum sia centjara ekzistado Esperanto transformiĝis en potencon rimedon por kreo de amikaj kontaktoj kaj rekta kunlaborado inter la popoloj, fariĝis „senduba socia fakto kaj grava socia faktoro”. * Sed vera amikeco interpopola ne povas realiĝi, antaŭ ol estos forigitaj la lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj — per akcepto de plene neŭtrala helpa internacia lingvo.

Hodiaŭ en nia mondo ne ekzistas „natura”, t.e. etna, nacia lingvo, kapabla plenumi la rolon de „lingva ponto”, inter la apartaj popoloj. Tiun rolon povas plenumi nur lingvo arta, t.e. lingvo apartenanta al neniun nacio, al neniun raso aŭ etna grupo, servanta al neniun ŝtato al neniun apartan registaron, politika, milita, religia aŭ ekonomia organizaĵo.

Gis nun estas konataj pli ol 500 planlingvaj projektoj, sed al ili ĉiuj mankas io trege grava — socia medio, kiu sola povus vivi ilin, servi al ili kiel eksperimenta bazo. Senigitaj de tiu bazo, ili kuŝas mortaj en la arkivoj de siaj kreintoj. El ĉiuj planlingvaj projektoj nur Esperanto — la projekto de d-ro L. L. Zamenhof, havas sian socian organismon, t.e. — sian propran „popolon” — la tutmondan esperantistaron.

*Vidu: „Deklaracio okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof” el „Memorlibro pri la Zamenhof-jaro”, 1960, paĝo 10.

Dum la kuranta 1987 brile finiĝis la unua kaj eble plej grava etapo de grandioza unujarcenta lingva eksperimento, dum kiu la lingva projekto de d-ro Zamenhof estis elprovita en preskaŭ ĉiuj sferoj de la homa agado: literaturo, teatro, tradukado, scienco kaj tekniko, internaciaj kongresoj kaj konferencoj ktp.

La ideo pri internacia solidareco, pri paco kaj amikeco inter la popoloj, pri lojala, sincera kaj honesta kunlaborado sur la bazo de egalrajteco kaj reciproka estimo inter ĉiuj — grandaj kaj malgrandaj, malriĉaj kaj riĉaj, fortaj kaj malfortaj popoloj, — estas enmetita en nian lingvon mem. Ĉiu, kiu komencas lerni ĝin, tuj eksentas internan kontenton pro la fakto, ke li ricevas la eblecon havi amikojn en proksimaj kaj foraj landoj kaj, partoprenante en la internacia E-movado por paco, kontribui kvankam modeste, al la kreo de monda paco. En nia nuntempo, grava per serioza danĝero pri neniigo de homaro kaj de la multmiljara civilizo sur nia planedo, la ideo pri internacia neŭtrala planlingvo kiel rimedo por unuigo kaj amikigo de la popoloj ne plu estas natva utopio, sed plej aktuala, necesega bezono, forta armilo en la manoj de la esperantistoj-pac batalantoj.

Ce la sojlo de sia 100-jariĝo la monda E-movado havas brilan bilancon — ĝi profunde enradikiĝis ne nur en Eŭropo, sed en multaj landoj de Ameriko kaj Azio: Japanio, Ĉinio; Aŭstralio, Nov-Zelando, Brazilo, Usono, Kubo k. a. Lastatempe, kiel sciata, ĝi konkeras poziciojn ankaŭ en Afriko...

Do, karaj amikoj de Esperanto, bonan vojon en ĝia dua jarcento!



EL LA PAROLADO DE D-RO ZAMENHOF EN LA UNUA UNIVERSALA KONGRESO ESPERANTISTA

(Boulogne-sur-Mer, 1905)

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas... Mi salutas vin ankaŭ, glora lando Francujo kaj bela urbo Bulonjo-sur-Mar, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ koran dankon al tiuj personoj kaj institucioj en Parizo, kiuj ĉe mia trapaso tra tiu ĉi glora urbo esprimis sub mia adresosian favoron por la afero Esperanto, nome al sinjoro la Ministro de la publika instruado, al la urbestro de Parizo, al la franca ligo de instruado kaj al multaj diversaj sciencaj eminentuloj.

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis registroj nek ministroj por ŝanĝi la politikan karton de la mondo; ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono; ne bruas paflegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas: ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korigos kaj potencigos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.

En la plej malproksima antikveco, kiu jam delonge elviŝiĝis el la memoro de la homaro kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj, kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn ideojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia

Interkompreniĝado inter ili estis absolute nebla.

Profetoj kaj poetoj revadis pri la tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion: sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri la dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo* kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montras al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiliĝu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alle, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu alian! Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla,venu al ni, kaj li konvertiĝos. Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, anstataŭ paroli flue; sed komparante ilian balbutadon kun la perfekte flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konscienca observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj.

... Ne venis ankoraŭ la tempo skribi oficialan historion de nia afero kaj mi timas, ke mi povas fari ian publikan maljustaĵon al tiu aŭ alia persono ĉe la kompara taksado de la meritoj de la diversaj batalantoj. Tial mi ne nomos ĉiun el ili aparte, sed al ĉiuj kune mi esprimas

* Boulogne-sur-Mer, Francio — Noto de la Red.

koran dankon por ilia laborado en la nomo de ĉiuj amikoj de Esperanto. Dek ok jaroj pasis de la tago, kiam Esperanto aperis en la mondo. Ne facilaj estis ĉi tiuj dek ok jaroj. Nun mi vidas antaŭ mi grandegan nombron da varmegaj amikoj de Esperanto, kiuj reprezentas per si preskaŭ ĉiujn landojn de la tera globo, preskaŭ ĉiujn naciojn de la mondo, ĉiujn rangojn, statojn kaj klasojn de la homoj. Tre granda kaj vasta estas jam nia literaturo, tre multaj estas niaj gazetoj, en la tuta mondo ni havas nun grupojn kaj klubojn esperantistajn, kaj al neniu klera homo en la mondo la nomo de nia afero nun estas jam nekonata. Kiam mi rigardas la nunan brilantan staton de nia afero, mi rememoras kortuŝite pri la unuaj pioniroj, kiuj laboris por nia afero en tiu malĝoja tempo, kiam ni ĉie renkontadis ankoraŭ nur mokon kaj persekuton. Multaj el ili vivas ankoraŭ kaj ili rigardas nun kun ĝojo la fruktojn de sia laborado.



Reprezentantoj de diversaj E-generacioj antaŭ la monumento de D-ro L. L. Zamenhof en Dimitrovgrad.

Kion Zamenhof skribis al Schleyer?

Karaj legantoj,

Antaŭ viaj okuloj estas letero de la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof al Johann Schleyer — la aŭtoro de Volapük. Kiel skribas al la redakcio nia kunlaboranto Nikola Nikolov, kiu afable disponigis al ni por aperigo fotokopion de tiu letero, „la enhavo de tiu Zamenhova letero, skribita antaŭ cent jaroj, estas tre interesa kaj instrua por la esperantistaro. Certe la legantoj kun intereso legos kaj relegos ĝin.“ Ankaŭ ni esperas pri tio.

„BE“

Varsovio, 27/XI/1887.

Estimata kaj estiminda sinjoro!

Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante la ridegon de l'amaso.

Varsovio, 27.XI.1887

Estimata kaj estiminda sinjoro!

Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante la ridegon de l'amaso. Mi mem plej bone komprenas kion Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon. Kiam mia laboro, jam estis preta, mi kvar jarojn devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado — ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.

Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük', mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük' ŝajnas al mi ne tute praktika; mi diris al mi, ke lingvo tutmonda devas esti antaŭ ĉio **komprenebla** kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis **internacia** devas resti netuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutmonda, oni povas krei nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj, ĉio cetera devas resti netuŝita. Car nenio persono estas tiel leĝdonanta por krei lingvon por la tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon de vortoj de lingvo, kun ĉiuj de l'landoj kaj urboj, kun ĉiuj sennombraj nomoj teknikaj etc.

Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de Volapük', mi laboris **ne kontraŭ** la Volapük' sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutmonda, kaj en kiu ajn formo l'homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi, ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo; se la juĝo de l'mondo estas ne decida, la „Lingvo internacia“ restos kune kun la „Volapük'“, kiel du amikoj, kiuj havas **unu** celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos **du** lingvojn kaj eĉ tio estas por la mondo multe pli bona ol resti tute sen lingvo tutmonda.

Pardonu ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malgentilo, sed por doni al Vi provon de mia lingvo.

Kun la plej granda estimo

Esperanto

Kial ne Esperanto?

„Lingvo universala devas esti filozofia laŭ sia gramatiko kaj empiria laŭ sia vortaro, t. e. ĝia gramatiko devas esti bazita sur logika analizo de pensado, kaj ĝia vortaro devas esti tirita el la lingvoj vivantaj.“

Charles RENOUVIER, franca filozofo

La nepra neceso koni, krom sia loka aŭ nacia lingvo, unu aŭ eĉ plurajn aliajn lingvojn, ne bezonas longan klarigon. En ĉiuj kampoj de la vivo ĝi aperas: en radio kaj televido, en turismo, komerco kaj industrio, dum sport-kaj kulturmanifestacioj, en la pli kaj pli internaciiganta politiko, en la scienca mondo. . .

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj ne aludas al iu ajn kontinento, regiono aŭ nacio. Ĝi transpasas la landlimojn kaj konsideras ne la francan, anglan, ĉinan, blankan aŭ nigran homon, sed *La Homon* kiel plene universalan, homan estaĵon. Nocio kiel „internacia solidareco“ kreskas en larĝaj tavoloj de la homaro.

Sed kune kun la konstatita internaciigo de la homaj rilatoj kaj la estiĝo de nova, internacia komunajo, vidiĝas ĉie en la mondo kontraŭa tendenco: pli granda konsciigo pri siaj propraj identeco, nacieco, etneco, pri sia aparteno al specifa homgrupo kun propraj lingvo kaj kulturo.

Tiu konsciigo ne plu permesas — almenaŭ jure — ke unu nacio superregas la aliajn, ĉu per sia lingvo, ĉu per sia kulturo, ĉu per sia ekonomio aŭ politiko.

Ĉiu homa grupo, natura kaj homogena, deziras ludi propran rolon, esti agnoskata kaj aprezata kiel tio kio ĝi estas kaj reprezentas.

En tiu ŝajne kontraŭa politika kunteksto situas la internacia lingvoproblemo.

Estas do konstatebla vero por ĉiu senantaŭjuĝa observanto, ke la lingva interkompreniĝo inter malsamlingvanoj tute ne estas solvita nek solvota dum la venontaj jaroj per la t. n. tradiciaj metodoj kaj iloj.

Ne temas ĉi tie pri interpretado, ĉar tiu estas ligita al salono, al materialo, al elektro, al la bonvolo de homoj perantaj kaj malofte ebligas veran, vivan konversacion. Pro la sama kialo, ni ne parolas pri tradukmaŝinoj,

kiuj estas tro komplikaj por “ordinara” homo, kaj ne permesas verajn, rektajn, viglajn homajn interrilatojn.

Pro ĉiuj tiuj donitaĵoj, ni rekomendas la konsideron de alia, nova, pli racia, eĉ revolucia kaj progresema solvo de la lingva problemo, nome per ĝeneraligita uzo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Kial Esperanto? Ĉar ĝi posedas preskaŭ ĉiujn fundamentajn ecojn, kiujn oni teorie povas postuli por ideala internacia lingvo.

Ĝi estas neŭtrala. Tio rezultas el la fakto, ke ĝi ne originis ĉe iu specifa nacio, sed en la cerbo de unu internacie pensanta homo kaj ke ĝi post preskaŭ unu jarcento neniam estis pretendata de iu ajn aparta nacio aŭ etno.

Dum la 3-a Universala Kongreso en Cambridge (Kembriĝ) en 1907, Zamenhof, la iniciatoro de Esperanto, substrekis tiun fakton:

„Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.“

Ĝi vere estas *internacia* en siaj gramatikaj strukturoj kaj en siaj vortradikoj, en siaj esprimoj kaj idiotismoj, kaj precipe en sia origina koncepto. La sekvonta citaĵo de Zamenhof, el la aldono al la „Dua Libro de l’Lingvo Internacia“ (1887), ne lasas ian dubon pri tio: „Sed mi ne havis la intencon eldoni aŭtore plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de l’kapo ĝis la piedoj. . . Unu homo tie povas esti nur iniciatoro, sed ne kreanto. Lingvo tutmonda devas esti pretigata paŝo post paŝo per la kunigita laborado de la civilizita mondo. . . [. . .] Tia komuna fundamento por la „Lingvo Internacia“ devas esti mia unua broŝuro „Lingvo Internacia — Antaŭparolo kaj plena lernolibro“. . . Cio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiuj el la vivantaj lingvoj.“

Kaj la evoluo de la lingvo fariĝis, kiel Zamenhof deziris kaj antaŭvidis. Ekzistas nun vera internacia komunajo, kiu sin esprimas en Esperanto, kiu riĉigas la lingvon kaj kiu pere de Esperanto pripensas kaj pridiskutas siajn problemojn interetne, ne etne.

Ĝi estas *facila, simpla, regula*. Tiuj facileco kaj simpleco, pri kiuj oni faris sciencajn es-

plorojn en Paderborn, ne estas signo de malriĉeco, male. La fama dana lingvisto Jespersen, ne parolante pri Esperanto, iam skribis: „Mi rigardas tiun lingvon la plej altrangan, kiu ebligas esprimi plej multon per malmultaj rimedoj, alivorte, kiu ebligas esprimi la plej grandan amason da signifoj pere de la plej simpla mekanismo.“

Ĝi estas *kompleta* lingvo, ne la sensanga kodo. Ĉiuj gamoj, ĉiuj nuancoj de la homa vivo, raciaj kaj emociaj, estas esprimeblaj en Esperanto. La poezio, originala kaj traduka, okupas gravan lokon en la Esperanto-literaturo; Zamenhof mem estis meritplena kaj talenta poeto. Ankaŭ pure sciencaj, raciaj verkoj aperas en la Lingvo Internacia, kaj estas pruvite ke Esperanto speciale taŭgas por komputilaj laboroj. En dekoj da „interretaj geedziĝoj“, Esperanto estas la ĉiutaga, natura lingvo kaj la gepatra lingvo de la infanoj. Ĉu, en tiu kazo, oni povas imagi Esperanton kiel malvarman kodon, kiel lingvan skeleton?

Gramatike, ĝi estas sintezo de la hindeŭropa lingvofamilio kaj en la vortstrukturoj ĝi estas aglutina, do pli orienta kaj afrika. Plie, ĉar la elementaj eroj estas memstaraj, ĝi ankaŭ similas al izolantaj lingvoj.

Zamenhof, kiu ne estis profesia lingvisto sed okulkuracisto, intuicie kaj per rezonado, komparo kaj dedukto kompilis sian lingvon laŭ la principo de neceso kaj sufiĉo. Li do ĉerpis el la de li konataj lingvoj tiujn elementojn, kiuj estas nepre necesaj, sed ankaŭ sufiĉaj por plena funkciado de kompleta lingvo. Tiel farinte, Zamenhof povis resumi la tutan gramatikon de sia lingvo en nur 16 senesceptaj reguloj. En la enkonduko de sia unua lernolibro li skribis: „Mi enkondukis plenan dismembrigon de la elementaj konceptoj (ideoj), kiuj estas esprimataj per memstaraj vortoj. La tuta lingvo konsistas ne el gramatike ŝanĝataj formoj de diversaj vortoj, sed el vortoj neŝanĝeblaj.“ Tio donas la aglutinan karakteron al la lingvo — ne hindeŭropa! — kaj faciligas al japanoj kaj ĉinoj la lernadon de Esperanto.

Responde al la kritiko, ke Esperanto de fakte estas eŭropa lingvo, ni povas diri:

a) Kiam Esperanto naskiĝis, Eŭropo efektive ludis unuarangan rolon en la mondo sur ĉiuj kampoj de la vivo.

b) Preskaŭ ĉiuj vortoj el la sciencoj, la teknologio, la ekonomio, kiuj estiĝis en la 19-a kaj 20-a jarcentoj, estas internaciaj, ne nur

eŭropaj. La plej grava fonto, el kiu ili originas, estas la greka kaj la latina lingvoj.

c) Absolute nenio kontraŭstaras la adopton de ne-eŭropaj radikoj en Esperanto. Ili senpene povas esti esperantigitaj kaj asimilitaj.

La internan evolueblon de sia lingvo Zamenhof vidis jene*: „Ĉar la lingvo internacia pli dependas de la volo de l'homoj ol de aliaj kondiĉoj — tiu procezo de uniformigado iros en ĝi multe pli rapide. La vortoj kreitaj malfeliĉe baldaŭ perdiĝos, kaj la vortoj feliĉe kreitaj, sed malegale sonantaj kelkan tempon batalos inter si kiel sinonimoj, sed jam post mallonga tempo ni vidos, ke unu el tiuj formoj estas uzata pli ofte kaj de pli granda parto de verkantoj ol ĉiuj aliaj formoj — kaj baldaŭ la unua formo elpuŝos ĉiujn ceterajn formojn, kiuj post kelka tempo simple mortos de neuzado.“

Ĉiuj ĝis nun proponitaj kaj aplikataj solvoj al la intergenta lingva problemo estas elitaj, t. e. rezervitaj al kelkaj privilegiitaj sociaj klasoj. Dum antaŭaj jarcentoj la latina kaj la franca estis la lingvoj de politikistoj, sciencistoj, kleruloj, de la nobelaro, de la alta ekleziularo, de la alta burĝaro. Hodiaŭ, la angla ankaŭ estas la lingvo de privilegiitaj homoj, kiuj havas la tempon, la okazon kaj la monon por dece lerni kaj asimili ĝin. Sed la grandaj amasoj da homoj, eĉ ne nur la pli malriĉaj, nur konas sian gepatran lingvon kaj tamen ankaŭ ili vojaĝas fremdlanden, ankaŭ ili rigardas la televidon kaj aŭskultas la radion kaj interrilatas kun fremduloj. Por tiuj estas nur unu solvo: facile lernebla, neŭtrala internacia lingvo kiel Esperanto. En nia epoko, kiam oni parolas pri demokratio, pri la rajtoj de la laboristoj, de la popolo, oni devus pripensi, ke sur la lingva kampo, nur Esperanto konsistigas demokratian solvon por la lingva problemo. Ne ekzistas alia!

Estas ridinde kaj eĉ danĝere pensi, ke la disvastiĝo de Esperanto forigus ĉiujn konfliktojn, ĉiujn malfacilaĵojn el la mondo. Tiu ideo eĉ ne meritas konsideron. Sed estas vere, ke komuna, neŭtrala lingvo povus faciligi la eblecon diskuti pri tiuj konfliktoj kaj malfacilaĵoj kaj tiel kune serĉi konvenajn solvojn, ĉar la nunaj diskutoj pere de interpretistoj fakte ne estas veraj diskutoj, sed nur paralelaj komunikadoj. Tro da nuancoj perdiĝas, tro da miskomprenoj persistas. La neŭtrala komunikilo povas krei favoran etoson, aŭ almenaŭ forigi unu gravan malfacilaĵon, la lingvan diversecon.

Por la granda amaso de la homoj, eĉ por kleruloj, pedagogoj, profesoroj, k. a. kiuj sciopovas nur sian gepatran lingvon, Esperanto

* Aldono al la Dua Libro, 1888 n^o 3, en *Originala Verkaro*, Leipzig, 1929, p. 35.

signifus malfermitan fenestron al la mondo. Pli kaj pli ĉiuspecaj dokumentoj estas disponeblaj en la internacia lingvo kaj la mond-literaturo jam nun estas bonege reprezentata. Sed imagu, kia estus la situacio, se Esperanto estus oficiale apogata kaj agnoskita kiel universala, dua lingvo por ĉiuj homoj. Kiom da senutila kaj temporaba penado, kiom da mono estus gajnotaj kaj rezervotaj por pli frukto-dona laboro!

La „Lingvo Internacia“ de Zamenhof estas finstadio de longa eksperimentado, sintezo de ĉio kio estis farita kaj pensita antaŭ li sur la kampo de internacia komunikilo. Ankoraŭ pliaj projektoj estiĝis poste, sed neniu havis longan vivon. Esperanto kontraŭe, vivas, evoluas, estas skribata kaj parolata de internacia vasta komunaj. Ĝi estas portanto de propra,

novspeca internacia kulturo. Ĝi sufiĉe evoluis kaj maturiĝis por servi kiel internacia lingvo neŭtrala en la mondo. Ĝi nur atendas kiam la politikaj respondeculoj estos pretaj serioze prikonsideri Esperanton kiel solvon por la internacia lingva Babelo.

Imagu la situacion, se ĉiuj politikistoj kaj ŝtatestroj povus interkomunikiĝadi ĉiumomente, ne nur en salono pere de interpretistoj, sed en la koridoroj, ĉetabulo, dumpromenade, en ĉiuj naturaj cirkonstancoj, rekte de homo al homo, sen ia lingva koncedo al la kolegoj. . . Ĉu vere nerealisma revo?

Edward SYMOENS,
membro de CED,

(El „La soci-politia, pedagogia kaj kultura valoro de Esperanto“)

LEIPZIG — URBO DE LA LABORISTA E-MOVADO

Okaze de la 75-a datreveno de fondo de la Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA), nia Internacia Foira Esperanto-Renkontiĝo (IFER — 1986) staris kun ĉiuj siaj kontribuoj sub tiu temo. Krom multaj aliaj paroladoj el diversaj vidpunktoj, mi elektis la kronologian sinsekvon de ĝia evoluo. La materialoj estas ĉerpitaj el la tiama gazetaro, ĉefe laborista, kaj aliaj aperintaĵoj, trovigantaj plejparte en la lejpigaj arkivoj kaj bibliotekoj kaj en konservitaj Esperanto-jurnaloj, kiel „Laborista Esperantisto“ kaj ties antaŭulo „Antaŭen“, „Germana Esperantisto“, en „Sennaciulo“, „Internaciisto“ k. a.

Dum la plej fruaj jaroj, ekde 1910, agis kiel lerta propagandisto, fervora instruanto kaj ĝenerale kiel „motoro“ de la ĉi-tiea esperantista movado Reinhold Voigt, 25-jara laboristo kaj sindikato. En 1906 li konatiĝis kun la Lingvo Internacia dum migrado tra diverslingvaj landoj, ekleris ĝin aŭtodidakte kaj tuj ekkonis ĝian valoron por la interkompreniĝo de la internacia laborista klaso. Li fariĝis arda adepto, tuj komencis koresponci kun multaj foraj landoj kaj fondis, kune kun siaj unuaj plej entuziasmaj gelnantoj, en 1910 la unuan esperantistan grupon „Fraterco“ en Leipzig. El ĝi kreskis kvanto da kapabluloj, kiuj poste mem fariĝis instruantoj. Reinhold Voigt kontaktis kun la jam ekzistantaj en Germanio dekunu laboristaj Esperanto-grupoj, kiuj sendepende unu de alia laboris propagande. La plejmulto el tiuj grupoj, i. a. en

Hamburgo, Munkeno, Dreseno, konvinkiĝis pri la neceso nepre kunligi por organizita evoluo kaj produktiva laboro ene de la movado kio efektiviĝis en 1911 per la fondo de GLEA, do ĝuste antaŭ 75 jaroj.

Mi nombris inter 1910 kaj 1914 90 varbefikajn, parte tre grandformatajn anoncojn en la „Lejpiga popolgazeto“, kiuj trafis certe la planitan celon. Jam en 1912 funkciis 17 kursoj samtempe, kun 200 gelnantoj, en 1913 — jam 14 pliaj en la diversaj urbkvartaloj kaj eĉ 16 instrukursoj kun 234 partoprenantoj dum la jaro 1914. Tiamaniere povis ekkreski forta grupo en la urbo.

La nova laborista unuiĝo en la tiama monarĥista Germanio instigis la policon al suspektema atento. En la policaj aktoj el la jaroj 1910 ĝis 1917 mi trovis detalajn raportojn pruvantaj la fortan evoluon de la lejpiga grupo en kadro de tiamaĵ anarkistoj, respegulantaj la energion kaj aktivecon de niaj kamaradoj.

La jaro 1919 komenciĝis denove kun intensa varbado kaj novaj kursoj. Ekskursoj unuiĝis plej ofte pli ol cent homojn, kiuj kantantaj laboristajn kantojn en Esperanto, kun flirtanta ruĝa flago, kun la verda stelo efikis forte pluan varbadon. Kelkaj el niaj malnovaj grupanoj (ankaŭ mi, partopreninta kiel filino de Reinhold Voigt) memoras tiujn ekskursojn.

Tiutempe la burĝaj esperantistoj intertraktis kun la laboristoj, sed

tiuj akceptis kunlaboron nur surlingva kampo. Estis fondita komisiono „por la librejo asocia“, konsistanta el lejpigaj kamaradoj; kaj denove lejpigano — Hugo Hempel, transprenis la libroservon por tuta Germanio.

Dum la III SAT-kongreso en Kassel (1923), laŭ iniciato de Adolf Wendt oni fondis „Sekcion de esperantistaj laboristaj sportuloj“. Wendt ankaŭ redaktis dum jaroj la „Laboristan sporton“ (respektive la sportaĵon en „Laborista Esperantisto“).

Precipe rimarkinda por la movado estis la fondo en 1923 de la Proleta Esperanto-Presservo (PEP). Unue afero nur de Leipzig, pli poste ĝin transprenis la ligo dum la 5-a ligotago en Chemnitz (nun Karl-Marx-Stadt). Ĝis oktobro 1924 estis senditaj 3360 manuskriptoj al 176 germanlingvaj redakcioj kaj 150 al 7 eksterlandaj presservoj de laboristaj organizaĵoj. Ĉiuj kapablaj gesamideanoj estis altiritaj al kunlaboro. Printempe de 1925 oni informis pri la apero de 4300 manuskriptoj pere de PEP. Komence de 1926 PEP havis ligojn kun 20 landoj. En 1927 Otto Bäßler organizis la presservon de SAT; por 1929 la statistiko mencias 103 artikolojn. Otto Bäßler indas esti nomata la plej aktiva kamarado dum la 20-aj jaroj. Estro de la Libropresista Esperanto-grupo en la „Saksa Laborista Gazeto“, li aperigis kun siaj kolegoj de 1924 ĝis 1932 ĉirkaŭ 380 artikolojn, raportojn, korespondieterojn precipe el la juna tiutempe Sovetunio, notojn, pri kunvenoj kaj kursoj, kiujn li kaj k-do

Richter gvidis en ruĝfrontbatalantaj rondo.

Otto Baŝler intime ligiĝis al la Soveta Esperanto-Asocio kaj al la Ruĝa Armeo, vojaĝis kiel delegito tra multaj urboj en Sovetio, vizitadis fabrikojn, kazernojn, instituciojn, teatrojn, infangardenojn, malsanulejojn, raportis kaj ĝustigis nemotivitajn imagojn pri la evoluo en la unua socialisma ŝtato kaj eĉ fariĝis honora pioniro de urbo Smolensk.

Ne nur la fakto, ke antaŭ 75 jaroj en Leipzig estis fondita LEA, rajtigas nin nomi ĝin urbo de la laborista movado.

Dum ĉiuj ligoj de GLEA kaj SAT-kongresoj leipziganoj kontribuis per gravaj proponoj por plibonigo de la komuna laboro, tiel ankaŭ per la rekomendo krei kondiĉojn por ununura proleta frata internacio, mondligo. En 1921 fondiĝis la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kun sidejo en Parizo, kies agentejo estis lokita kiel Esperanto-Instituto sub la gvido de prof. D-ro Dietterle en Leipzig.

La grupo el Leipzig aliĝis en 1924 al la Internacia Laborista Helpejo. La eldonejo „Hirt & Sohn“ eldonis la valoran kolekton „Internacia mondliteraturo“ kaj la Instituto

por Laborista Klerigo (ABI) inkludis Esperanto-kursojn en sian programon. La libropresista Esperanto-grupo sukcesis interesi la presejon de porblindula literaturo kaj la Esperanta fako de la blindula instituto ludis poste ne malgravan rolon.

Plej gravaj okazintaĵoj por la lejpziga esperantistaro estis la Eksterordinara Ligo de GLEA en aprilo 1927 kaj la IX mondkongreso de SAT en 1929, kiujn partoprenis kelkaj el la nun ankoraŭ vivantaj esperantistoj en Leipzig. La lejpziga gazeto raportis detale pri la sinsekvo de la programo, aperigis fotojn kaj opiniojn, „ke tiu IX SAT-kongreso unufoje superos laŭnombre la samtempe okazantan kongreson de la burĝaj esperantistoj en Budapeŝto“. Dum 4 tagoj Radio Leipzig regule raportis pri la kongreso.

Nepre menciinda, ĉar grava por la tuta laborista Esperanto-movado, estas la Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo (EKRELO), kaj la fondita en 1930 debitejo de la Soveta Esperanto-Asocio en Moskvo, kiun prizorgis Walter Kampfrad. Ĝi proponis 70 sovetajn publikaĵojn, el kiuj kelkaj aperadis regule. La intenco eldoni Lenin-verkojn en 16 volumoj

ne plu povis realiĝi. Post domtraserado ĉe Kampfrad la 1-an de novembro 1933, la tuta stoko da literaturo estis nenligita de la polico kaj Kampfrad estis arestita dum 6 monatoj.

Mi povus menci ankoraŭ multajn faktojn, ekz. la kunlaboron en IFA, t. e. la Intereskomunumo por Laborista Kulturo, aŭ la kursojn en la fondita en 1931 Marksista Laborista Lernejo. La Esperanto-presejo „Uns“ en Leipzig estis kolektiva SAT-membro, kiu presis multajn librojn kaj varbmateriojn.

Krom la komunista, ankaŭ la socialdemokratia gazetaro publikigis artikolojn, raportojn, anoncojn, k. a. pri Esperanto, sed kun la paso de la jaroj, dum la 20-aj kaj la komenco de la 30-aj jaroj, ĉiam pli kaj pli neŭtrale kun politike sendangeraj temoj, kontraŭe al la komunista gazetaro, kiu ĝis ĝia malpermeso en 1933 konsekvence defendis la interesojn de la laboristaro.

Mi esperas, ke ĉio supre dirita prezentas konvinkan pruvon, ke Leipzig plenrajte estas nomata „urbo de la laborista Esperanto-movado“.

I. KOLBE (Leipzig)

Ardaj kaj sindonaj batalantoj

La Kvara Nacia Konferenco de Veteranoj-Esperantistoj en nia lando okazis la 9-an kaj 10-an de majo j. k. en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Partoprenis la konferencon pli ol 30 delegitoj el diversaj regionoj de Bulgario.

Pri la laboro de la Sekcio de Veteranoj-Esperantistoj ĉe BEA raportis ĝia prezidanto Stojan Kostadinov. Li substrekis la meritojn de la veteranoj — pli ol 600 personoj, — pri la evoluo kaj sukcesoj de nia Esperanto-movado. Tiuj personoj, kiuj ekregis Esperanton dum la kruelaj jaroj de la faŝisma reĝimo, restis fidelaj al la socialismaj ideoj, al la E-movado kaj obstine laboris por internacia interkompreniĝo kaj tutmonda paco.

En la eldiroj de la veteranoj-esperantistoj estis alte pritaksita ilia grava kontribuo al la bulgara E-movado. Bedaŭrinde, niaj E-organizaĵoj tre malofte uzas iliajn sperton kaj konojn en sia ĉiutaga aktivado.

Post la diskutado d-ro D. Donev faris raporton pri la taskoj de la esperantistoj en la pacmovado.

La nacia konferenco elektis 11-membran estraron — 5 personoj el Sofio kaj 6 el diversaj distriktoj. Kiel prezidanto estis denove elektita Stojan Kostadinov el Sofio.

Estis decidite, ke la plenumkomitato konsistanta el 5 membroj, loĝantaj en la ĉefurbo, kunvoku minimume dufoje en la jaro plenkunsidojn de la Sekcio.

La nova estraro preparos planon por la estonta agadperiodo, por pli efika kontribuo de la veteranoj al nia movado.

La konferenco decidis krei reton da respondeculoj ne nur en la distriktaĵoj, sed en ĉiu loĝloko, kie loĝas esperantistoj-veteranoj.

Gasto de la konferenco estis S-ro Allan Schwarz el



Britujo, kiu por la dua fojo perfektigas siajn lingvokonojn en la Internacia Kursejo — Pisanica.

Post la arta programo, plenumita de la aktorino Angelina Sotirova, la partoprenantoj en la konferenco vizitis vidindaĵojn en Smoljan.

Haim LEVI



LA CENTJARA ORIGINALA ESPERANTA POEZIO

Espero al Despero" (1911) „Kion la Vivo Alportis" (1911) kaj „Aŭtunaj Floroj" (1912).

Tiutempe tre aktivis la germanino **Marie Hankel**, kiu en 1911 aperigis la poemaron „Sabl'eroj", sed ŝiaj poemoj estas iom primitivaj kaj ili respegulas la ĝeneralajn ideologiajn tendencojn de la tiama Esperanto-movado.

La Unua Mondmilito ne nur skuis la mondon kaj kaŭzis gravajn ŝanĝojn en la socia kaj politika vivo de la homaro — ĝi kaŭzis ŝanĝojn ankaŭ en la ideologio de la Esperanto-movado, en ĝiaj kulturaj valoroj. La poezio estas ĝenro, kiu respegulas ĉiujn ŝanĝojn en la politika kaj socia vivo, tial la originala Esperanta poezio prezentis materian esprimon de la nova pensmaniero de la esperantistoj.

En nian poezion eniris nova ondo da junaj Esperanto-poetoj, kiuj ne nur modernigis kaj maturigis ĝin, sed montris la direkton, laŭ kiu ĝi devas evolui estonte kaj donis brilajn poeziajn modelojn al ĉiuj sekvaj generacioj da poetoj.

Post la fino de la Unua Mondmilito Budapeŝto estiĝis centro de la Esperanto-literaturo. Tie laboris du el la kolosoj de nia poezio **Kálmán Kalocsay** kaj **Julio Baghy**.

Ĉiu literaturo bezonas tribunon kaj en Budapeŝto estis kreita la rimarkinda literatura revuo „Literatura Mondo" kiu arigis ĉirkaŭ si la tiamajn Esperanto-poetojn, sed la direktoj de la poezia evoluo difinis **Kalocsay** kaj **Baghy**. **Kalocsay** per sia eksterordinara intelekto, filozofia percepto pri la vivo kaj subtila kompreno de la poeziaj postuloj maturigis la Esperantan poezion, **Baghy** alportis al ĝi la spontaneman emocion, riĉigis ĝin per sopiro al amo kaj kompreniĝo, tamen ne abstrakta, kiel en la poemoj de niaj poetoj el la antaŭmilita periodo, sed amo vere homa kaj realisma. Ni nur rememoru lian simplan, tamen impresan poemon „*Ce Samovaro*" el la poemaro „*Pilgrimo*" (1926).

Ĉirkaŭ „Literatura Mondo" kolektigis multaj talentaj poetoj, kiel **Lajos Tárkonyi**, **Imre Baranyai**, **Ferenc Szilágyi**, **Adamson**, **Hilda Dresden**, **Brian Price-Heywood**, **Hovorka**, **Kurzens**, **Maura**, **Newell**, **Núñez-Dubus** kaj aliaj.

Tuj post la Unua Mondmilito en Sovetunio formigis la alia grava

centro de Esperanto-poezio. La Granda Oktobra Socialisma Revolucio proklamis la unuan en la mondo proletan ŝtaton kaj forte inspiris la Esperanto-poetojn. En 1917 la talenta Esperanto-poeto **Eŭgeno Miĥalski** fondis en Saratov la literaturan revuon „*Libera Torento*". **Miĥalski** alportis al nia poezio la revolucionan optimismon, la fortan kredon je la feliĉa nova vivo. La poemoj de **Miĥalski** respegulas ne nur novan mondpercepton, sed **Miĥalski** mem, kiel originala Esperanto-poeto estas genia. Lia poezio — bildeca, metafora, fleksebla, impresas per la anĝela ritmo kaj eksterordinara abundo de rimoj. **Miĥalski** estis ege fruktodona kaj postlasis multajn poemarojn: „*Unua Ondo*" (1818), „*Du Poemoj*" (1922), „*Prologo*" (1929), „*Fajro Kuracas*" (1932), „*Kantoj de l'Amo kaj Sopiro*" (1934). Bedaŭrinde pluraj gravaj liaj manuskriptoj perdisiĝis.

— La kerno de la soveta proleta poezio — krom **Miĥalski**, estis **Nikolaj Nekrasov**, **Nikolaj Rohlov**, **Vasilij Eroŝenko** kaj aliaj. Al la grupo de proletaj Esperanto-poetoj aliĝis la bulgaroj **Asen Grigorov**, **Hristo Gorov**, la sarlanda karboministo **Josef Burger**, la japana proleta poeto **Ito Saburo** kaj aliaj.

Analizante la originalan Esperanto-poezion ni konstatas, ke ĝis la Dua Mondmilito la centro de nia poezio estis Budapeŝto, kie aktivis **Kalocsay**, **Baghy** kaj aliaj budapeŝtaj esperantistoj ĉirkaŭ la revuo. „*Literatura Mondo*". En 1934 ĝi aperigis la poemaron „*Dekdu Poetoj*" kaj en 1938 — la poemaron „*Naŭ Poetoj*", en kiujn eniris la verkoj de ĉiuj aktivaj kunlaborantoj de „*Literatura Mondo*" el diversaj landoj.

Parolante pri tiu ĉi periodo, ni ne rajtas preterlasi ankaŭ la nomojn de poetoj kiel ekzemple la svedino **Magda Carlsson**, la germano **Teo Jung**, kiu en 1926 aperigis la poemaron „*La Alta Kanto de la Amo*" kaj en 1935 la poemaron „*Ek al Bataŭ*", la nederlandano **Adalbert Smit**, aŭtoro de la poemaroj „*Fajreroj*" (1927) kaj „*Rosetoj*" (1930).

Dum la Dua Mondmilito la originala-poezio ne eksilentis. Belegajn poemojn kontraŭ la faŝismo kaj kontraŭ la milito verkis la bulgaroj **Asen Grigorov**, **Hristo Gorov**, **Violin Oljanov**, la nederlanda ha-

La originala Esperanta poezio estas fakto, kiun nun neniu povas ignori. Ĝi naskiĝis ĝuste antaŭ unu jarcento kaj la unua Esperanta poeto estas **Lazaro Zamenhof**, kreinto de la Lingvo Internacia. La poemoj de **Zamenhof** esprimas ĉefe la ideon, la etoson de Esperanto. Tuj post liaj unuaj poemoj aperas pluraj lirikaĵoj verkoj, kiuj donas la animon de la nova lingvo.

Dum la periodo 1887—1918 la plej elstara Esperanto-poeto estas **Antoni Grabowski**, kies originalaj poemoj eniris la libron „*El Parnaso de Popoloj*" (1912). Li bone regas la poezian teknikon kaj sciopovas emocie interpreti siajn pensojn kaj ideojn. Dum tiu ĉi periodo aktivis **Vasilij Nikolaevič Devjatnin**, ruso, kies originalaj poemoj aperis en la poemaro „*Nevola Mortiginto*" (1896). La rimoj kaj ritmoj en la poemoj de **Devjatnin** estas simplaj, sed li posedas akran poezian senton. Krom **Grabowski** kaj **Devjatnin** tiutempe aktive verkas ankaŭ **Leo Belmont**, aŭtoro de la poemokolekto „*Sonoj Esperantaj*" (1908), **Antoni Kofman**, kiu impresas per sia rakontpoemo „*Filino de Ifah*" kaj **Felikso Zamenhof**, la frato de **L. L. Zamenhof**, eldoninta en 1905 la poemaron „*Homa Doloro*".

A. Grabowski, **V. Devjatnin**, **L. Belmont**, **A. Kofman** kaj **F. Zamenhof** estas la unua poezia kvino, kiu donis fortan puŝon al la originala Esperanta poezio. Laŭ deveno ili estas slavoj, tial en la unuaj originalaj Esperantaj poemoj forte sentebles la slava literatura influo. Dum tiu ĉi tempo en nia poezio aperis la nomo de la sviso **Edmond Privat**. En 1912 li eldonis la poemaron „*Tra l'Silento*", kies plej karakteriza trajto estas ĝia lirikeco.

Tuj post la unua slava generacio, en la originala Esperanta poezio, aperas nova slava grupo da poetoj kiel **Leono Zamenhof**, **Romano**

Frenkel, **Georgo Deŝkin**, **Maria Stanislavova Tenner**, **Stanislav Schulhof** kaj aliaj. La rusino **Maria Stanislavova Tenner** posedis delikatan poezian senton, sed bedaŭrinde ŝi ne tre abunde verkis inter la poetoj el la dua slava generacio. Sendube la plej elstara estis la ĉeĥo **Stanislav Schulhof**, kies originalaj poemoj aperis en la poemaroj „*Per*

venlaboristo Lodewijk Cornelis Deij, kies sinceraj antifaŝismaj poemoj, aperigitaj en pluraj revuoj, ege impresis la legantojn, sed bedaŭrinde Lodewijk Deij, kies talento estas senduba, iom post iom tute forlasis la originalan Esperanto-poezion.

La venko super la faŝismo malfermis novajn helajn horizontojn antaŭ la originala Esperanta poezio. Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy per inspiritaj poemoj salutis la liberecon kaj la novan vivon, priantis la estiĝantan pacon en la mondo. Denove ekaperis „Literatura Mondo“, komencis aperi novaj literaturaj revuoj, kiel „La Nica Literatura Revuo“, „Monda Kulturo“, „Hungara Vivo“ kaj aliaj, en kiuj estis publikigitaj la novaj poemoj de Baghy kaj Kalocsay. Reaktivigis Lajos Tárkony, kiu en 1964 eldonis la poemaron „Soifo“ kaj Imre (Emriko) Baranyai, kies poemaro „Ekzilo kaj Azilo“ aperis en 1962.

En Sovetunio eksonis la forta kaj originala poezia voĉo de la elstara Esperanto-poeto K. Gusev. En Bulgario plu aktive verkis Asen Grigorov, Hristo Gorov, Violin Oljanov, Canko Murgin (kiu

en 1955 aperigis sian poemaron „Kanto pri la Paco“). Plurajn originalajn poemojn verkis la talenta Esperanta poeto Armand Su el Ĉinio.

Aktivis plu same la poetoj el la dua periodo — Hilda Dresen, Magda Carlsson, Henri Vatré, A. Nuñez-Dubus kaj aliaj.

En 1952 prof. J. Régulo-Pérez en La Laguno fondis la rimarkindan Esperantan libroeldonejon „Stafeto“ kaj la unua libro de tiu ĉi eldonejo estis la poemaro „Kvaropo“, per kiu en nia Esperanta poezio debutis kvar gravaj poetoj: William Auld, John Sharp Dinwoodie, John Islay Francis kaj Reto Mario Rossetti. Malgraŭ ke ili sekvis la tradiciojn, kiujn formis Kalocsay, Baghy kaj la poetoj ĉirkaŭ „Literatura Mondo“ ili alportis al nia poezio novajn temojn, novajn motivojn, modernigis kaj aktualigis ĝin, eĉ entute renovigis nian originalan poezion. Ĉiuj ili sentis sin respondecaj pri la estonta sorto de la mondo. Tio plej klare videblas en la versaĵoj de William Auld kaj ĉefe en lia longa poemo „La Infana Raso“, aperinta en 1955.

Dum tiu ĉi periodo en nia poezio eksonis pluraj virinaj voĉoj,

inter kiuj elstaras la anglino Marjorie Boulton, kiu aperigis multajn poemarojn, kiel „Kontralte“ (1955), „Cent Ĝojkantoj“ (1957), „Eroj“ (1959) k. a., la italino Clelia Concerio-Guglielminetti (kies poemaro „Eta Vivo“ aperis en 1970) la ĉeĥino Eli Urbanová, kiu publikigis jam tri poemarojn: „Nur Tri Koloroj“ (1960), „El Subaj Fontoj“ (1982), „Verso kaj Larmo“ (1985).

Fortan puŝon al nia poezio donis poetoj kiel Victor Sadler, kies poemaro „Memkritiko“ (1967), estas unika en nia originala poezio. Tre originala kaj individua estas la poezia kreado de Edwin de Kock, aŭtoro de pluraj poemaroj, inter kiuj „Ombro de la Kvara Dimensio“ (1961), „Fajro sur Mia Lango“ (1987), „Poemoj kaj Prozeroj“ (1970) k. a.

Inter la pli junaj poetoj nepre menciindas la nomoj de Nicolino Rossi, Kris Long, Mauro Nervi, Imre Szabó kaj aliaj.

La originala Esperanta poezio plu evoluas kaj je la centjara jubileo de la Lingvo Internacia ĝi estas elokventa pruvo, ke Esperanto apartenas al la plej signifaj kulturaj valoroj de la homaro.

Georgi MIHALKOV

William AULD (Britio)

LA PACO EBLAS

Ĉu norda lando skuas sin vekige post vintra dormo, kaj la kulturistoj surpaŝas kampojn vikle kaj feliĉe. Jam semoj ĝermas kaj fermentas gistoj. Fekundas nia mond' printemposojle: kio minacas lupe kaj orgojle?

Kia sovaĝo, kia pratribismo impulsas homojn al perforto krima, riski pri homfarita kataklismo, paradi por timigo misanima? Kio valoras pli ol kampaniloj, trankvilaj gregoj, belo en luliloj?

Kiel ni povas gvidi nian sorton? Per amo aŭ malamo. Ni elektas: mergigi en akordon aŭ en hordon: la iron la unua pasdirektas. Do iru ni en nesuebla fido, ke am' pli fortas ol milita strido.

Rifuzu ni malamon interhoman malindajn prainstinkojn ni forjetu! Pacopostulon faru ni, tioman ke homoj tra la mondo ĝin ripetu! Ni fine pruvu, ke pacemaj fortoj pli multenombros ol militkohortoj!

Por la komuna lingvo ni peradu komunajn sentojn pri la homfatale, tiel ke nia unuec' persvadu gefratojn tra la mondo pri l' realo de l' paco vojo al la ĝusta celo: militon for, kunvivo en talero.

(El la verkaro „Poemaro por Paco“, eldonita honore al Internacia Jaro de Paco, UEA, 1986)

Hilda DRESEN

PADUSO

Paduso, reĝino de l' nordo kun blanka floro, unua printempa heroldo, ornam' de l' kamparo.

En ĉiu ĝardeno vi floras, ĉe ĉiu dometo, agrable kaj dolĉe odoros en nokta kvieto.

Kaj kvazaŭ neĝeroj, hezite, petal' post petalo, ŝutigas floroj' via glite dum sia disfalo.

Edwin de KOCK

AŬTUNA POSTTAGMEZO

Foliolange arboj flustras, korosange karno flustras pri la aŭtuno. Kalviĝas arboj antaŭvente. Mi kalviĝas mortosente, malgraŭ la suno. Atendi torturas dum sablo de l' nuno pretersusuras, malgraŭ la suno.

FLUGAS NIAJ KANTOJ!...

Dum la UEA-kongreso en Reykjavik 1977 d-ro Humphrey Tonkin esprimis la ideon pri fando de Internacia Esperanto-Horo, sed nur en 1980 dum la kongreso en Stockholm tiu ideo realiĝis dank' al la entuziasmo kaj ambicio de Dimitr Terzjev, muzik-instruisto kaj komponisto el Sofio, Bulgario.

En Stockholm la sorto decidis, ke mi loĝu en sama privata ĉambro kune kun samideano Terzjev kaj alia bulgara muzikinstruisto — Ivan Apostolov el Petriĉ. Sekvo de la interkonatiĝo estis, ke mi komencis ĉeestis la ekzercadojn de la novnaskita ĥoro, malgraŭ ke mi mem ne kantas.

Unu el la improvizitaj ekzercoj estis en la subtegmento de malnova gimnazio. La akustiko tie estis tre bona, kaj mi tute raviĝis pro la belsono de l'kantado. Mi komencis varbi por la ĥoro, kaj la unua varbito estis unu el miaj lernantinoj, Ellen Eriksson, el mia hejmurbo Norrköping. Dum la sekvaj jaroj mi varbis plurajn ĝeĥoranojn el diversaj landoj. Post la debuto en Stockholm la ĥoro kantis en Antwerpen 1982, Budapeŝto 1983, Augsburg 1985 kaj do 1986 en Bydgoszcz.

La konsisto de la ĥoro ĉiam estis vere internacia, tamen ĝia kerno estis bulgara, ne nur ĉar la ĥorestro estis bulgaro, sed laŭ mia kompreno ankaŭ, kaj eble ĉefe, ĉar la bulgara popolo estas kantema kaj pli ol multaj aliaj nacioj sukcesis konservi sian folkloron. Jen la kialo de tiu mia supozo: en la jaro 1948 mi aliĝis al sveda grupo, kiu partoprenis la laboron de junulara brigado ĉe la fervojkonstruado inter Loveĉ kaj Trojan. Marŝante al sia laborloko kaj returne, kun fosiloj kaj pioĉoj surŝulte, la bulgaraj ĝeĥunuloj ĉiam kantis. Kaj kiel ili kantis! La memoro pri tiu verva kantado restos ĉe mi dum mia tuta vivo.

La repertuaro de la ĥoro estis varia kaj ampleksis folklorajn kaj popularajn kantojn, sed enmiksita an-

kaŭ klasikajn verkojn de famaj komponistoj, ekz. Mozart, Bach kaj Beethoven. (Fiere mi notas, ke al la esperanta teksto de "Himno de ĝojo" el la 9-a simfonio de L. V. Beethoven, mi mem iomete kontribuis).

Devizo de la ĥoro en formo de kantofrazo tekstas jene: „Kuniĝu ni per nia kant', per nia kant' kuniĝu ni!“ Oni kantas ĝin komence kaj fine de la ekzercoj, sed ĝi ankaŭ havas la praktikan taskon kunvoki la ĝeĥoranojn dum la kongresoj. Mi memoras speciale okazon antaŭ la ĉefenirejo de la kongresa rotondo en Budapeŝto. Kolektiĝis grupo da ĝeĥoranoj, ĉi-foje sufiĉe granda kaj entenanta ĉiujn voĉojn, ankaŭ bonajn (sopranoj kaj aldoj kutime plimultas). Oni kantis ripete la kunvokan devizon kaj amasiĝinta publiko entuziasme aplaudis.

La samideanoj, kiuj reprezentis la ĥoron en Bydgoszcz estis entute 21, nome: 1 el Belgio, 3 el Britio, 6 el Bulgario, 3 el Francio, 2 el FR Germanio, 2 el Nederlando, 3 el Pollando kaj 1 el Svedio. Ĉiuj estis invititaj de Pola Esperanto-Asocio kaj ĉiurilate ĝuis modelan gastamon. La repertuaro konsistis el ne malpli ol 12 kantoj — originalaj en Esperanto aŭ tradukitaj el diversaj lingvoj. Mi povis ĝoje konstati, ke la publiko alte taksis ilin — la longdaŭra, forta aplaŭdo substrekkis tion.

La Internacia Esperanta Ĥoro jam iĝis tradicia parto de la kongresaj programoj kaj valora ero de la Esperanta kulturo. Dum nia Jubilea Jaro mi deziras al la Ĥoro daŭran progreson kaj ĉiam kreskantan reĝimon.

Norrköping, Svedio

Andreo, ROOS

SOLENAJO EN HANOJO

La 16-an de aprilo 1987, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kunlige kun la Stata Unesko-Komisiono de Vjetnamio organizis en Hanojo amasan renkontiĝon dediĉitan al la 100-jariĝo de Esperanto, responde al la Rezolucio de UNESKO koncerne tiun eventon. La sukcesplena aranĝo estis raportita de la Televido, la Radio, la Inform-agentejo kaj diversaj enlandaj gazetoj. Inaŭguris la jubilean kunvenon prof. Hô Tồn Trinh, direktoro de la Beletra Instituto kaj vicprezidanto de la Vjetnama UNESKO-Komisiono; li emfazis la taŭgecon de Esperanto por kulturaj kaj sociaj rilatoj inter diversaj nacioj en la nuntempo kaj akcentis la gravecon de VPEA en la disvastigo de Esperanto en nia lando, serve al la mondpaco kaj al la proksimiĝo de la mondaj popoloj. La poeto DAO ANH KHA, prezidanto de VPEA, faris prelegon, per kiu li traktis la problemon de Esperanto el vidpunktoj lingvistika kaj soci-historia, konsideris la komunikilon Esperanto kiel integran parton de la nuntempa scienc-teknika revolucio, efikan ilon por la pacdefendo kaj unu el la faktoroj por la homara evoluado.

Enkadre de tiu jubileo, la plej granda tagjurnalo en la lando, „La Popolo“, publikigis longan artikolon de DAO ANH KHA titolitan „Esperanto, komunikilo de la homaro“. Klarigante la historian signifon de la rezolucio de UNESKO koncerne Esperanton, la aŭtoro konkludas: „La aktuala procedo utiligi lingvojn ĉe UN estas nur portempa kaj ne racia... Problemoj financa kaj teknika estos pli bone solvataj, se



Esperanto estos utiligata kiel la sole internacia komunikilo. Tio estas tute nova problemo, kiu metiĝas antaŭ la homaro“.

DANG DINH DAM

Jubilea konkurso

Karaj geaŭskultantoj!

Lige kun la 100-jariĝo de ESPE-
RANTO ni organizas specialan ju-
bilean konkurson kaj ni kore invi-
tas vin al partopreno. Ni samtem-
pe petas popularigi la konkurson
inter viaj geamikoj kaj samklu-
banoj.

1. Kiaj pensoj venas al vi lige
kun la 100-jariĝo de Esperan-
to, ĝisnuna aplikado kaj ankaŭ
evoluo de ĉi tiu lingvo?
2. Kiagrade la kono de Esperanto
ebligis al vi pli bonan ekkonon
de la mondo?
3. Ĉu en via lando (urbo) oni faras
ion por omaĝi la 100-jariĝon
de Esperanto kaj se jes, kion?
4. Kiel vi pritaksas la nunan staton
de la lingvo, kiel ĝi devus evo-
lui kaj kiaj estas viaj ĉi-kon-
cernaj esperoj?

Niaj E-elsendoj akompanas la
E-movadon ĉiutage de pli ol kva-
ronjarcento. Lige kun tio ni de-
zirus ekscii:

5. Kion vi opinias pri la signifoj



de la E-elsendoj de RADIO
POLONIA por la E-movado kaj
ilia rolo en la informado pri
Pollando kaj kian signifon por
vi persone havas ĉi tiuj elsen-
doj?

6. Kiaj estas viaj program-propo-
noj por estonteco? Kiujn temojn,
program-ideojn indas reali-
gi en niaj elsendoj en la plej
proksima estonteco? Ĉu kaj se
jes, kiel oni devus/oni povus
pli vaste popularigi ilin en la
esperantistaj medioj?

Inter ĉiuj partoprenantoj en la
konkurso ni lotumos multe da E-
eldonaĵoj, sonkasetoj kun la voĉo
de Doktoro Zamenhof, diapozitiv-
seriojn kun E-tekstoj ktp. Krome
inter la aŭtoroj de la plej interesaj
konkursajoj oni lotumos aldonajn
premiojn i. a. en la formo de polaj
popolartaĵoj.

La respondojn oni sendu ĝis la
30-a de novembro 1987 al: RADIO
POLONIA, Esperanto-Redakcio,
00-950 Varsovio, Box-46, Pol-
lando — kun la kromnoto sur la
koverto „ESPERANTO-KON-
KURSO“. La rezultoj de la lo-
tumado ni anoncos la 15-an de de-
cembro 1987 en ĉiuj tiutagaj E-
elsendoj de Radio Polonia.

Esperanto-redakcio de
Radio Polonia

Radio Pekino celebras

Karaj gesamideanoj,

La jaro 1987 estas aparte gra-
va por ni, ĉar en tiu ĉi jaro ni festo-
s ne nur la centjaran jubileon de
Esperanto, sed ankaŭ la 40-an da-
trevenon de Radio Pekino, kiu jam
22 jarojn seninterrompe disaŭdi-
gas siajn programojn en la Inter-
nacia Lingvo Esperanto.

Radio Pekino de post sia naski-
ĝo ĉiam fervore laboras por pliiĝi
interkomprenigon kaj amikecon
inter la ĉina popolo kaj la popoloj
de diversaj landoj kaj akceli la
aferon de paco kaj progreso.

Radio Pekino faras sian disaŭdi-
gon kiel en la komuna lingvo kaj
4 dialektoj de Ĉinio tiel ankaŭ en
38 fremdaj lingvoj, sume 142,5
horojn ĉiutage. Ĝia voĉo atingas
Azion, Afrikon, Amerikon, Eŭro-
pon kaj Oceanion.

Radio Pekino ĉiam rilatas favo-
re al Esperanto. Antaŭ 22 jaroj,
t. e. la 19-an de decembro 1964, ĝi
komencis siajn elsendojn en Espe-
ranto. Esperantistoj en pli ol 50
landoj nun povas ĉiutage aŭdi la
voĉon de Radio Pekino en Espe-
ranto. Per tio Radio Pekino faris



kaj daŭre faras sian kontribuon al
la monda Esperanto-movado.

Por festi la 40-an datrevenon de
Radio Pekino kaj pliiĝintigi la
kontaktojn inter Radio Pekino kaj
la aŭskultantoj, ĝis septembro de

la kuranta jaro Radio Pekino pe-
tas siajn diverslandajn aŭskultan-
tojn kontribui per sia verko pri la
temo „Mi kaj Radio Pekino“. Vi
povas verki diversforme. Ĉu prozo,
ĉu poemo, ĉu pentraĵo, ĉu foto,
ĉiaj verkoj estas bonvenaj. En viaj
verkoj vi povas tute libere rakonti
viajn kontaktojn kun Radio Pe-
kino, ĉiajn impresojn kaj opiniojn
pri ĝiaj programoj, viajn dezirojn
kaj proponojn al Radio Pekino.

Ĉiuj kontribuantoj ricevos me-
morkonfirmilon, filatelan tutajon
kaj insignon. Ni elektos el la kon-
tribuajoj bonajn verkojn kaj juĝos
ilin laŭ 3 gradoj. La gajnintoj ri-
cevos laŭgrade premion: ĉinstila
pentraĵo, aŭ apogkuseno, aŭ silk-
kaptuko, aŭ ĉina metiartaĵo. Bo-
najn artikolojn ni disaŭdigas en
nia elsendo.

Karaj geamikoj, agadu kune kun
ni! Festu kune kun ni! Por la cent-
jara jubileo de Esperanto, por la
40-a datreveno de Radio Pekino,
ni kunlaboru plej sincere kaj sa-
mideane!

Esperanto-Sekcio
de Radio Pekino

LA PERSPEKTIVO — PRAKTIKA UZADO

Estimataj gelegantoj,

En la antaŭtago de la 100-jariĝo de Esperanto — jam unu jaron per tiu-ĉi rubriko ni regule rakontas al vi pri la disvolvigo kaj nuna stato de diversnaciaj junularaj E-movadoj — prezentitaj de ĝiaj estraranoj. Vi ekscilis pri la agado de la junaj esperantistoj en Hungario, Hispanio (speciale Katalunio), Ĉeĥoslovakio (Slovakio), Francio, Norvegio, kaj Jugoslavio. „Bulgara Esperantisto“ renkontigis vin kun estraranoj de TEJO nome ĝia prezidanto Ian Jackson kaj la ĝenerala sekretario Jan Koszmaluk. En nia enketo pri la stato kaj estonteco de Esperanto mondscale kaj pri ĝia junulara movado vi legis la opiniojn tiurilatajn de konataj junaj esperantistoj: László Szilvasi (Hungario), Kostas Zafiarakis (Greklando), Héctor Alós i Font (Katalunio).

Nun vi havas eblecon renkontiĝi kun juna E-aktivulo kaj amiko de Bulgario — Andy Künzli. Li estas 24-jara, studento pri slava filologio en la Universitato de Zürich. Andy Künzli estas ĝenerala sekretario de la Svisa Esperanto-Societo, redaktoro de la oficiala organo de TEJO — „TEJO-tutmondo“ (TT), kaj redaktoro en la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia en Berno.

— S-ro Künzli, kiaj estas viaj avantaĝoj kaj malfacilaĵoj kiel redaktoro de „TEJO-tutmondo“?

— Mi diros pri la celoj de la gazeto, ĉar ili estas ankaŭ ĝiaj avantaĝoj (kaj kompreneble la miaj kiel redaktoro). Do, la celoj ĝis nun estis starigi kontaktojn ĉefe kun tiuj novaj junuloj en Esperanto-movado, kiuj ŝatus diri sian opinion, rakonti pri la E-agado en sia lando kaj dividi sian sperton pere de TT. Tiamaniere la gazeto fariĝas peranto inter la diversaj landoj kaj junuloj. Per TT estas serĉataj la novaj fortoj en nia movado. En la pasinta tempo mi havis bonajn kontaktojn, ekzemple, Kongo—Brasavil, Argentino, Ĉilio; de tempo al tempo venas artikoloj ankaŭ el Kameruno. Hans Bakker el Nederlando okupiĝas pri la kontaktoj kun Afriko. Pere de li mi akceptas artikolojn ankaŭ el tiu kontinento. Alia avantaĝo estas, ke TT fariĝis oficiala organo de TEJO. Tio signifas, ke ĝi povas havi pli grandan influon en la junulara E-movado. Krome ĝi regule aperas. Sed ofte mi ne estas kontenta pri la akurateco de TEJO-estraranoj kiuj neĝustatempe verkas siajn raportojn pri estrarkaj komitatkunsidoj — tiel mi, kaj respektive la legantoj de TT, estas tre malfrue informataj.

Pri la malavantaĝoj. TT aperas sesfoje kaj tio por ĝiaj celoj estas tro nesufiĉa. La financa flanko de la gazeto ankoraŭ estas problemo, ĉar nuntempe UEA kaj TEJO ne povas disponigi pli da mono.

— Kia estas la populareco de „TEJO-tutmondo“?

— Kiam oni presigis la gazeton en Svislando, la eldonkvanto variis inter 800—1500 ekz. — laŭ la bezonoj. Ĝin oni abonas en proksimume 70 landoj. Iu-foje la gazeto „vojaĝas“ tra la lando t. e. ke unu gazeto atingas kelkajn adresojn unu post la alia. Pro tio mi ne povas ĝuste diri, kiom da homoj efektive legas TT. Ĝiaj kunlaborantoj tre varias. Nun sur mia skribtablo kuŝas multaj artikoloj el diversaj landoj. Ankaŭ el Bulgario mi ofte ricevas kalendarajn informojn. Venas artikoloj el la triamondaj landoj, sed dominas eŭropaj sciigoj.

— Mi petas, dividi vian opinion pri la nuntempa junulara E-movado.

— Mi povas paroli pri Svislando, kie la movado ne estas forta kaj neniam estis forta. Ĝenerale la junulara movado ege stagnas kaj verŝajne tiu situacio estas simila en ĉiuj landoj. La ĉefa kialo estas, ke junularo ne estas konvinkita pri la realaj avantaĝoj de Esperanto. Oni preferas lerni aliajn lingvojn, kiujn oni konsideras pli efikaj. Alia faktoro estas nesufiĉo de libera tempo kaj ankaŭ mankas alloga poresperanta propagando.

— En la jaro de 100-jariĝo de Esperanto kiaj estas laŭ vi la perspektivoj antaŭ la Internacia Lingvo?

— Post la Dua Mondmilito Esperanto eniris en la internacian turismon, kiu fariĝis amasa. Diversaĝaj homoj vojaĝas, serĉas kaj realigas kontaktojn pere de la Internacia Lingvo — jen la granda ŝanco kaj perspektivo de lingvo. Mi diras tion surbaze de mia propra sperto, ĉar por mi Esperanto estas preskaŭ ĝepatra lingvo. La problemoj de la Internacia Lingvo laŭ mi estas, ke ankoraŭ mankas signifa agnosko flanke de neesperantista publiko. Interalie pro tio, ke oni riporĉas Esperanton, ke ĝi estas lingvo artefarita sen kulturo, malgraŭ ke ni atingis dum tiuj cent jaroj konsiderindajn sukcesojn, ekzistas granda Esperanta literaturo, ekzistas nia movado, praktika uzado de la lingvo. La Esperanta kulturo povas mezuri siajn atingojn komparinte ilin kun la sukcesoj atingitaj dum la sama periodo de kiu ajn nacia kulturo.

— Kion vi rakontos al nia legantaro pri la Svisa Esperanto-movado?

— Ĉe ni la movado estas malforta el vidpunkto de la nombro de esperantistoj. Sed en Svislando estas granda E-tradicio. Svisa Esperanto-Societo estis la dua landa organizaĵo ĉe UEA, fondita post la franca — en 1902. En nia lando estas Kultura Centro Esperantista, kiu similas al via Internacia E-Kursejo en Pisanica. Ĉe ni vivis gravaj homoj, kiuj influis al Esperanto-movado: Hektor Hodler — la filo de nia fama pentristo Ferdinand Hodler. H. Hodler fondis UEA en Genevo. Ankaŭ estas Svisa Radio Internacia, kiu regule dissendas esperantlingve prelegojn kaj novaĵojn.

Nun en la Jubilea Jaro ni kolektis niajn fortojn por okazigi tri regionajn semajnfinojn en la germana, franca kaj itala lingvopartoj de nia lando. Dum tiuj tagoj ni invitos prelegi pri Esperanto prelegantojn altnivele preparitajn. Ni estas konvinkitaj, ke pere de tiuj semajnfinoj la svisoj povos racie kompreni la fenomenon Esperanto kaj kontribui al ĝi.

— Kio altiras vin al Bulgario?

— Mi estas en via lando trian fojon kaj mi esperas, ke mi denove revenos ĉi-tien. Via lando multe plaĉas al mi. La rilatoj inter la homoj konserviĝis pli naturaj ol ekzemple en mia lando. Ankaŭ mi ŝatas vian folkloron.

Dufoje mi vojaĝis tra Bulgario kiel gasto de BEA kaj BEJ kaj mi efektivigis kontaktojn kun multaj esperantistoj. Miaj impresoj ĝenerale estas tre pozitivaj, ĉar mi vidas, ke la lokaj societoj laboras por atingi sukcesojn en la lingva scipovo aŭ por prepari pli allogan programon, sed laŭ mi ankoraŭ ne sufiĉas la altnivelaj instruistoj. Fakte tio estas problemoj en Esperanto-movado ĝenerale. Krome, laŭ mi, la bulgaraj esperantistoj devas pli ofte praktiki la lingvon.

Intervjuis: Maria JANKOVA

INTERNACIA RENKONTIGO

De la 12-a ĝis la 19-a de aprilo 1987 en Rostov — Jaroslava regiono, sub la aŭspicio de CK de VLKSM* kaj kun la helpo de la Internacia Turisma Buroo „Sputnik“, okazis la 28-a Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (SEJT), dediĉita al la 70-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj al la 100-jariĝo de Esperanto.

Organizantoj de la renkontiĝo estis la Junulara Komisiono de ASE — kaj la jaroslavl E-klubo „Ora Ringo“.

Unuafoje por partopreno en SEJT estis invititaj gastoj el la socialismaj landoj de Eŭropo — alvenis grupoj el Hungario kaj Bulgario.

La Internacia Turisma Centro „Rostov Granda“ kunvenigis 155 esperantistojn el 38 urboj de Rusio, Armenio, Ukrainio, Gruzio, Belorusio, Latvio, Litovio, Dagestano.

La 28-a SEJT estis solene malfermita la 13-an de aprilo de Valentin Seguro — vicprezidanto de la Junulara Komisiono ĉe ASE. Salutparolis la vicprezidanto de Rostova Turisma Centro A. G. Golišin. En la nomo de eksterlandaj gastoj parolis Zászló Szilvási (Hungario) kaj Nevjana Krásteva (Bulgario). Estis tralegita kaj unuanime akceptita la teksto de gratulelegramo al la XX Kongreso de VLKSM.

Dum la arango estis organizita renkontiĝo de junaj esperantistoj kun la sekretario de la Jaroslava Regiona Komitato de Komsomolo V. J. Simonov. Li kore salutis ilin, montris intereson al problemoj de la es-

perantista movado kaj bondeziris sukceson al ĝia estonta disvolvigo.

La dommastroj de SEJT proponis riĉenhavan kaj varian programon: seminarioj, raportoj kaj diskutoj pri aktualaj problemoj de nia nuntempo, ekz. pri konceptoj de la junaj esperantistoj. Interesajn raportojn prezentis Susanna Maĉkalova, Valentin Seguro, László Szilvási, Venelin Vasilev, Geza Felső, Natalia Lupova.

Niaj sovetiaj amikoj proponis ankaŭ interesan kulturprogramon. Estis organizitaj ekskursoj al la urboj Jaroslavl kaj Pereslavl. Ni vizitis muzeojn kaj arkitekturajn monumentojn. Agrablajn rememorojn ni konservis pri la koncerto de artaj kolektivoj en Jaroslavl, kie ni estis gastoj de la loka E-klubo kun prezidanto Vladimir Popov. En Rostov Granda speciale por ni estis invitita Moskva ĉambra ĵaz-ensemblo „Kadans“ — laŭreato de multaj internaciaj konkursoj. Ni havis eblecon ankaŭ vidi originalajn filmojn fariĝintajn speciale por esperantistoj aŭ sonigitajn en Esperanton. Sub komuna titolo „Dnestr'86“ la prezidanto de Moskva scienca Esperanta Klubo Lev Medvedev kaj la prezidanto de Ternopola Interklubo Igor Puškar montris al ni 5 filmojn pri ekologiaj problemoj de rivero Dnestr. Ne malpli multan intereson vekis la aliaj programeroj: koncerto de la partoprenantoj en SEJT, ĝaja kaj sagaca konkurso k. s. Estis elektitaj Miss kaj Mister „Esperanto“ — 87.

Malgraŭ la malbona vetero ĉiuj esperantistoj partprenis en Lenina labortago „Subotnik“.

Nia partopreno en la 28-a SEJT estis fruktodona interŝanĝo de sperto kaj rezultis veran amikiĝon kun sovetiaj junaj esperantistoj.

*VLKSM — Sovetia Komsomolo

Nevjana KRÁSTEVA



Komuna foto por memoro

DISTRIKTA ARANĜO

La Distrikta Junulara Esperanto-grupo en Plovdiv okazigis sian unuan renkontiĝon en 1987, la 11-an kaj la 12-an de aprilo en Karlovo. Ĝi estis dediĉita al la 150-a datreveno de la naskiĝo de Vasil Levski.

Kunvenis ĉirkaŭ 40 gejunuloj, inter kiuj estis ankaŭ reprezentantoj de Sofia distrikto — ses esperantistoj el Samokov.

La partoprenantoj en la renkontiĝo ĝuis riĉan kaj varian programon. Ĝi komenciĝis sabate vespere. Salutparolis la prezidanto de la loka E-societo ing. Bojidar Leonov kaj la sekretario de DE de BEA en Plovdiv Fani Mihajlova. Sekvis prelego pri la vivo kaj fardo de Levski prezentita de B. Leonov. Mallonga kvizo ebligis al la ĉeestantoj konkuri pri temo „Vasil Levski en la bulgara literaturo“.

La dua parto de la vespera programo estis amuza kaj celis la plej aktivan partoprenon de ĉiuj. Agrabla muziko kaj dancoj kontribuis al kreo de ĝaja kaj amika atmosfero. Interesaj ludoj, gvidataj de G. Angelova, sukcese distris la gejunulojn. Plej atentokapta tamen estis la humura teatraĵeto plenumita de la novfondita amatora duo A. Cokolov — I. Dimitrov.

Dimanĉe, malgraŭ la malbona vetero, la junaj esperantistoj vizitis la naskiĝdomon de Levski kaj ekskursis al la monaĥejo de Sopot — ĉama kaŝejo de Levski.

La renkontiĝo estis sukcesa kaj ni esperas, ke la sekvajn partoprenoj pli granda nombro da gejunuloj.

Dankon al la esperantistoj de Karlovo, kiuj certigis al ni tre bonajn kondiĉojn.

Emilia PEJČINOVA

Levski en ni mem...



Mercia MacDermott antaŭ la monumento de V. Levski en lia naskiĝurbo Karlovo

Mercia MacDermott estas konata al ĉiu bulgaro dank' al ŝiaj libroj pri Vasil Levski kaj Goce Delĉev. Ŝi verkis ankaŭ „Historio de Bulgario“ kaj nun laboras super dokumenta libro pri Dimităr Blagoev. En la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ kaj en la „Supera Pedagogia Instituto“ en Blagoevgrad ŝi gvidas specialajn kursojn pri la naci-liberigaj bataloj en Makedonio kaj la Odrina provinco en la periodo ĝis la Balkanaj Militoj.

F Dum la pasintjaraj Tagoj de la Kulturo (20—30. X. 1986) ŝi gastis al la loĝantoj de v. Krân, regiono de Kazanlâk kaj respondis al multaj demandoj. Jen ĉi-sube eltiraĵoj el ŝiaj respondoj:

„En Jugoslavio, en 1947 mi konatiĝis kun bulgaraj junuloj-brigadanoj. Ili multe parolis pri sia patrolando, impresis min per sia soifo pri laboro, per sia entuziasmo. Mi estis studentino de rusa filologio. Rusio estis mia unua amo, sed mi ekamis ankaŭ Bulgarion. Sajnas al mi, ke ne ekzistas kontraŭdiro, ĉar ĉiu bulgaro amas la rusan popolon. La sekvan jaron mi alvenis Bulgarion kun studenta brigado kiu laboris sur barajlago „Koprinka“. Tiam ĉiuj vojoj estis nepavitaj kaj kotaj — sen asfalto. Mi memoras, ke mankis kuraciloj — la lando estis ricevinta malbonan heredaĵon de la pasinteco. Kanazlâk estis malgranda, unuetaĝa urbo, sed estis videble, ke ĝi vekigis por nova vivo. Mi rememoras, ke oni aranĝis por la brigadanoj renkontiĝon kun Georgi Dimitrov. Dimitrov

akceptis nin en la rezidejo Evksinograd ĉe la Nigra Maro. Oni fiksas 20 minutojn, sed ni interparolis kun li du horojn. Mi sciis pri la Lejpciga proceso — tiam Dimitrov diris „Ne!“ al la faŝismo. Dimitrov estis saĝa, sincera, li esprimis bonkorecon kaj amon al la junaj homoj. Samtempe li estis majesta, sed li fariĝis por ni tiom proksima. Al neniuj venis la ideo peti de li aŭtografon. Mi havas nur foton de tiu ĉi renkontiĝo. Li diris: „La marksismo estas kiel torĉo, kiun vi devas teni forte en la manoj, marŝante antaŭen en la mallumo, se vi ĵetos la torĉon, vi falos en la abismon.“

De tiam datiĝas mia intereso al via patrolando. Kiam mi kolektis materialojn pri „Historio de Bulgario“, forte impresis min la ĉarma personeco de Vasil Levski. Ni, angloj, ne havas tian heroon — jam 9 jarcentojn en nia lando ne ekzistas sklaveco. Mi komprenis, ke Levski estas pli granda ol ĉiuj revoluciuloj, pri kiuj mi estis leginta ĝis tiam. Ĉar li kreis ion novan kaj originalan — la revolucion organizadon. Li prilaboris la teorion pri la organizita revolucia batalo, kion neniuj faris antaŭe. Liaj ideoj estas validaj kaj nun kaj por la morgaŭa tago. Li diras: „Ne eblas enporti revolucion el ekstere, la popolo devas organiziĝi por revolucio“. Levski pensis organizi la tutan bulgaran popolon de Nigra Maro ĝis Ohrid. Per unu sukcesa revolucio la bulgaroj devus prezentiĝi antaŭ la grandaj ŝtatoj kiel venkintoj, sed ne kiel kompatindaj sklavoj. Ĉar li sciis, ke registaroj de la grandaj ŝtatoj estas senkompataj eĉ al siaj popoloj. La ekzemplo de Levski estas imitinda por ĉiuj popoloj, kiuj ne volas vivi sub jugo. Liaj vortoj al la mondo estas: „Havu paciencon kaj grandan amon al sia popolo“.

Levski havis sindonajn kamaradojn, kiuj helpis al li. Levski pereis, ĉar iuj komitatanoj, ekzemple Dimitro Obŝti, ne obeis la disciplinon.

Mi neniam interesiĝis pri la tombo de Levski. Levski estas en ni, viva li estas. Ni havas nur unu eblecon simili al li: vivi kaj labori kiel li, esti honestaj kaj disciplinitaj, pli multe kontribui al la bonfarto de nia popolo. La memoro de Levski ne postulas vortojn, sed agojn. Ni povas longtempe esplori la vivon de Levski, sed ni ne povos malkovri engi eĉ unu malhelan makuleton.

Dimo MARTINOV



BELGA DELEGITARO EN VELIKO TĀRNOVO

Kiel estis jam anoncote („B. E.“, No 8, 1986), Esperanto peris por la interamikigo de la distrikta packomitatoj en Veliko Tärnovo kaj Liège, Belgio. Post la subskribita kontrakto, la interŝanĝo de leteroj kaj proponoj daŭris seninterrompe. Nun la ĝemeliĝo alpaŝis novan pli altan, praktikan ŝtupon.

La 12-an de majo j.k. en Veliko Tärnovo alvenis oficiala belga delegitaro en konsisto: d-ro Gaston Ninan — vicprezidanto de la Lieja departament apackomitato, kaj René Deprez — aktivulo de MEM kaj membro de la sama komitato, por fari la unuan viziton al bulgaraj pacdefendantoj. En la Domo de sindikatoj okazis oficiala renkontiĝo, gvidata de k-do Rajčo Penčev — prezidanto de la distrikta packomitato. Ĉeestis reprezentantoj de gravaj sociaj organizaĵoj: Patrolanda Fronto, Movado de Bulgaraj virinoj, Komitato pri Eŭropa Sekureco kaj Kunlaborado, Movado „Standardo de la paco“, Eklezio, Societo por Disvastigo de Sciencaj Konoj „Georgi Kirkov“ kaj de la Distrikta Estraro de BEA.

El la gastoj la unua prenis la parolon René Deprez. En perfekta Esperanto li informis la ĉeestantaron pri la batalo kontraŭ la nuklea danĝero en Belgio kaj pri la aktivecoj de la belga esperantistaro ĉi direkte. Li substrekis: „Ĝis nun nia porpaca komitato amikiĝis kun apartaj urboj en diversaj landoj. Nun dank' al Esperanto, estas efektivigita ĝemeliĝo inter du movadoj — porpaca kaj esperantista. Tio estas grava fenomeno ne nur por la porpaca movado, sed same por nia kaj via E-movado, kiel sekvinda ekzemplo. Ni apelacias al ĉiuj bulgaraj esperantistoj partopreni aktive la bulgaran pacmovadon kaj tiamaniere helpi la noblan tutmondan pacbatalon.“

Ankoraŭfoje en Veliko Tärnovo respondecaj personoj havis eblecon aŭdi la belsonan internacian lingvon, konvinkiĝi pri la serioza socia rolo de la esperantistoj en nia maltrankvila mondo.

Aparta renkontiĝo estis aranĝita en la ejo de la Distrikta Estraro de BEA honore al René Deprez. Regis intima, vere esperantista etoso. Estis preparolitaj proektoj por pli efika reciproka kunlaboro, okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto.

Vizitinte Gorna Orjaĥovica, Sviŝtov, Pavlikeni kaj aliajn urbojn, niaj gastoj pliriĉigis siajn impresojn pri nova Bulgario.

Hristo MANOLOV

TAGOJ DE ESPERANTA KULTURO EN RUSE

Jam delonge preparitaj, ili okazis la 9-an kaj 10-an de majo j. k. Sub la aŭspicio de la Distrikta Konsilantaro por Spirita Disvolviĝo la 9-an de majo matene, en la Domo de Tekniko Hristo Gorov, heroo de socialisma laboro kaj prezidanto de BEA, solene inauguris interesan ekspozicion pri la Esperanto-movado. Tiun ĉi

esperantistan feston partoprenis ankaŭ Maria Nankova, prezidantino de la Distrikta Konsilantaro por Spirita Disvolviĝo, Jordan Kazakov — prezidanto de la Jubilea organiza komitato kaj fakestro en la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio, gastoj el la ĝemelurboj Potŝdam (GDR) kaj Torun (Pollando) el la distriktoj de V. Tärnovo, Gabrovo, Ŝumen kaj Targoviŝte.

La saman tagon posttagmeze en la plenplena salono de la Domo de Tekniko komenciĝis jubilea tuturba solenaĵo. Raporton pri la 100-jariĝo de Esperanto faris la prezidanto de DE de BEA Georgi Dobrev. Sekvis la salutvortoj de Hristo Gorov, kiu dekoris la prezidanton kaj la du vicprezidantojn de DE de BEA per jubileaj insignoj. Laŭ decido de DE de BEA per specialaj honoraj insignoj estis solene dekoritaj ankaŭ E-veteranoj kaj la unua sekretario de la Komunuma Komitato de BKP — ing. Georgi Tabakov, la prezidantino de la Distrikta Konsilantaro por Spirita Disvolviĝo Maria Nankova kaj aliaj lokaj sociagantoj kaj aktivuloj de Esperanto-movado.

La riĉenhavan artprogramon partoprenis Penčo Penčev kaj Nikolaj Nikolov — muzikistoj el la popola instrumenta ensemblo „Gusla“, laŭreatoj de Koprivŝtica'86; artgrupo ĉe urba societo „Liberio“ kaj lernejo „Vasil Kolarov“, la operkantistinoj Ĵana Cikalova kaj Ljuba Vălkova, la artistoj de pup teatro en Ruse prezentis la esperantlingvan spektaklon „La trezoro“.

La sekvan tagon la partoprenantoj en la festo faris persipan ekskurson sur Danubo.

„AŬRORO“ — RESTARIGITA



Urbo Vjatovo, distrikto de Ruse, estas unu el la novaj urboj en nia lando. Antaŭ 18 jaroj en la tiamaj vilaĝoj Vjatovo ekzistis Esperanto-societo „Aŭroro“. Multaj el ĝiaj membroj forpasis, kaj la societo ĉesis funkcii. Tamen dum la lastaj jaroj junaj homoj flamiĝis la torĉon de la esperantismo en tiu loĝloko. Laŭ iniciato de la juna infaninstruistino Darinka Dimova kaj de la Komunuma Konsilantaro por Spirita Disvolviĝo en Vjatovo estis organizita kurso de Esperanto, anoncote eĉ en la loka ĵurnalo „Podem“ (Supreniĝo). Post la fino de la kurso en decembro pas-

intjare, okazis kunveno por restarigo de la antaŭa Esperanto-societo, sed ĉi-foje nomita „Suprenigo“. Kiel prezidantino oni elektis Darinka Radeva, kiu samtempe estas unu el la gvidantoj de klubo „Juna Esperantisto“, ĉe la Distrikta Junulara Domo en Ruse. La kunvenon partoprenis la prezidanto de DE de BEA en Ruse Georgi Dobrev, kiu dekoris ĉiujn partoprenintojn per esperantaj insignoj, kaj bonvenigis ilin en la vicojn de la distrikta esperantista organizaĵo.

Jordan KALINOV

RENKONTIGO KUN ĈINIO

Gabrovo. E-societo „Verda Torĉo“ organizis vesperon, dediĉitan al la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, 1986.

La pentristo-esperantisto Valentin Atanasov, partopreninto en la kongreso, projekciis al la ĉeestantoj filmon pri la malfermo de la kongreso kaj pri tiu malproksima kaj interesa lando.

Ni aŭskultis la salutparoladon de la prezidanto de UEA s-ro Tonkin al la partoprenantoj en la kongreso.

La kamerao permesis al ni enrigardi en la kongreshalon, kondukis nin al la granda Muro, longa 6000 km, kies konstruado komenciĝis en 5-a jarcento a. n. e., en la periodo de Militantaj Regnoj. Ĝi serpentumas laŭ la krestoj de la montoĉenoj Janshan kaj Yinshan, kiuj etendiĝas tra norda Ĉinio de la Oriento ĝis la Okcidento. La Granda Muro estas videbla de la luno.

Ni vidis ankaŭ la iaman Imperiestran Palacon en Pekino, kiu estis rezidejo de 24 ĉinaj imperiestroj — de la mezo de 14-a jc. ĝis la komenco de 20-a jc. Nun ĝi estas muzeo kaj alifirigas multe da turistoj dank' al siaj specifaj arkitekturo kaj valoraj kolektoj de artoj.

Ni kore dankas al V. Atanasov pri lia majstra filmo, ĉar li faris al ni grandan plezuron, konigante al ni foran Ĉinion.

Senja TIROVA

BONA INICIATO

Kune kun la diversaj aranĝoj dediĉitaj al la 100-jara jubileo de Esperanto, inter la ŝmena esperantistaro naskiĝis la bona iniciato — organizi regulajn renkontigojn de la membroj de la 5 urbaj E-societoj. Ili okazas ĉiun unuan lundon de la monato kaj domastro de ĉiu aparta renkontigo estas sinsekve ĉiu societo. La celo estas plivigligi la kontaktojn kaj la kunlaboron de la ŝmenaj esperantistoj.

Jam duan fojon dommastroj de urba E-renkontigo estis la medicinistoj-esperantistoj, membroj de societo „Sano“. La 2-an de marto j. k. en la halo de la sindikata biblioteko de la distrikta malsanulejo „Vasil Kolarov“, kunvenis geesperantistoj el la societoj „Sano“, „Vekigo“ (urba), „Metalurgo“ (ĉe la Entreprenejo por prilaborado de aluminio) kaj el la plej juna — la fervojista societo „Verda Semaforo“. Karaj gastoj estis reprezentantoj de E-societo „Ora Epoko“ — u. Preslav. La prezidantino de DE de BEA — Ŝumen, Veska Dragostinova, salutis la ĉeestantojn. La prezidanto de „Sano“ d-ro Ljudmil Conov rakontis pri la partopreno de societaj membroj en 5-a IMEK (Svein — GDR). Per lumbildoj li konatigis la ĉeestantojn kun la pitoreska historia Meklenburga ĉefurbo Svein. Li ankaŭ montris belajn lumbildojn pri la ĝemelurbo Debreen, kie li kaj V. Dragostinova pasintjare partoprenis E-solenaĵon lige kun la 750-jariĝo de la urbo.

Cvjatko TODOROV

LA 20-JARA „LEONO“

La jubileon de sia societo „Leono“ la esperantistoj el Nomina Klisura — distrikto de Pazarĝik, ofsciale festos

la 20-an de septembro (dimanche), 1987, je la 10-a horo, en kafejo „Komsomol“, ĉe la Kulturdomo. Por pli detalaj informoj bonvolu skribi al adreso: Esperanto-Societo „Leono“, BG-4468 Mamina Klisura (Pazarĝik).

Jordan NIKOLOV

INTERESA PRELEGO PRI PLANLINGVOJ

La 27-an de marto ĉi-jare en la urba E-klubejo en Plovdiv estis nek unu libera loko. Alvenis multaj esperantistoj kaj studentoj el la Supera Medicina kaj Supera Agrikultura institutoj, inter kiuj estis studentoj el Afriko.

Laŭ iniciato de la distrikta junulara E-grupo en nia urbo gastis la juna lingvistino Kremona Baceva. Si prelegis pri la planlingvoj kaj nia nuntempo.

La ĉeestantoj ricevis ege interesan kaj utilan informon pri la historio, evoluo kaj nuntempa stato de la planlingvoj kaj pri la rilato de la nuntempa lingvoscienco al ili.

Unuafoje multaj el la ĉeestantoj aŭdis kiel sonas Volapük, Ido, Interlingua kaj aliaj planlingvoj.

Post la prelego okazis interesa diskuto.

Vladimir JELEV

El Sovetunio

NI KUNVENIS EN LA MARA URBO

En la printempa monato aprilo ni denove, dekkvinfoje, kolektiĝis en la sovetia suda havenurbo Odeso, kie okazis la tradicia aranĝo KOR (Kiŝineva—Odesa Renkontigo), dediĉita al du grandaj eventoj — 70-jariĝo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj 100-jariĝo de la internacia lingvo Esperanto. La renkontigon partoprenis ĉirkaŭ 200 gesamideanoj el diversaj regionoj de Sovetunio.

Dum du tagoj la ĉeestantoj aktive partoprenis riĉan havan programon: prelegoj pri la jubileo, ekskursoj tra la antikva parto de la urbo, mitingo apud la monumento de L. L. Zamenhof, vizito de diversaj muzeoj. Novan interesan programon prezentis geklubanoj el Kievo, Odeso, Hersono.

En la ejo, kie okazis la aranĝo, estis organizita ekspozicio de infanaj desegnaĵoj sub titolo „Ni volas pacon“.

Vladimir GIRBA

EKSPOZICIO DE INFANBILDOJ

La klubo „Verda Stono“ aranĝas internacian ekspozicion de infanaj bildoj. Ĝia celo estas subteni kaj fortikigi la E-movadon en nia regiono. Rekompence ĉiu partoprenonto ricevos bildojn de niaj infanoj.

Nia adreso: Kamenec-Podolskij, a. j. 110, Esperanto-klubo 281900, Sovetunio.

SENDU VIAN SALUTKARTON!

Okaze de la centjariĝo de Esperanto, la 15-jara E-klubo „Juna Koro“ aranĝos letervesperon la 25-an de septembro 1987. Ni atendas esperantlingvajn bildkartojn por demonstri al la oficialaj instancoj en nia urbo la disvastigon de Esperanto tra la mondo.

Ni bezonas ankaŭ vian salutkarton!

Nia adreso estas: „Juna Koro“

H-8900 Zalaegerszeg

Pf. 263

Hungario



BULGARIO

128 gelernantoj (9—13-jaraj) dez. kor. kun samaĝuloj el ĉl. Komuna adreso: 5250 Svišov, „Hemus“ 25 A.
EMILIANA NACEVA (26-jara, instruistino) — 5370 Drjanovo, str. „Bačo Kiro“ 33 — pri ĉt, kun ĉl.
RUMJANA KARASLAVOVA, Asenovgrad, str. „Georgi Dimitrov“ 111, et. 5. ap. 14 — pri ĉt, kun ĉl.
MARIANA PETROVA (10-jara lernantino) — 2040 Dolna Banja, str. „Boris Gaĝanov“ 2, vñ. 3, ap. 2 — pri ĉt, kun ĉl.
ZORA HADDA BELLI — 2040 Dolna Banja, str. „Georgi Dimitrov“ 105 — pri ĉt, kun ĉl, kolektas PM.
14 gelernantoj (9-jaraj) dez. kor. kun samaĝuloj el ĉl. Komuna adreso: Dobrinka Gaĝanova, 2040 Dolna Banja, str. „Rilska voda“ 35.

POLLANDO

ROBERT PLEWKA — str. Rynkowa 2; 58-305 Wałbrzych — pri sporto, historio, arto, muziko, politiko, filozofio, vojaĝo — kun ĉl.
ROMAN BAŁUKA — str. Krótka 9, 58-305 Wałbrzych — pri sporto, muziko, vojaĝoj, matematiko — kun ĉl.
GRZEGORZ SWIECH — str. J. Marchlewskiego 37, 58-210 Szczawno — Zdrój — pri muziko, historio sporto, geografio, arto, marinistiko kaj vojaĝoj kun ĉl.
ADAM GŁÓD — str. „H. Sawidzkiej“ 20a — 58-305 Wałbrzych — pri sporto, muziko, literaturo, arto, vojaĝoj, historio — kun ĉl.
JOLANTA BARTOG (22-jara, fraŭlino), ul. Hetmanska 58 A/24,60-219 Poznań — kun ĉl pri turismo, kino, foto, muziko, kolektas BK.
ANDRZEJ BUTKIEWICZ, (27-jara laboristo) Jasionowo 16-411 Szypliszki — pri turismo, geografio, foto kaj sporto — kun ĉl. Kolektas BK kaj PM.
JANINA TROJAN (38-jara/ — 93-322 Łódź, ul. Mieszczanska 15/27 — pri geografio kaj historio kun bulgaroj, kolektas PM, BK kaj turismajn prospektojn.

SOVETUNIO

JULIA SERBINA (18-jara studentino) — 2 Krasnodarskaja 129/2-97, Rostov-Dono 58 — pri fremdaj lingvoj, ŝako, literaturo, muziko — kun ĉl. Povas korespondi ankaŭ angle.
ELENA ALDAHINA (fraŭlino) — pl. „Lenina“ 8b, kv. 12, 357500 Pjatigorsk — pri ĉt, kun ĉl.
VLADIMIR KAMINSKIJ (34-jara) — SU-334 882, Sudak, Krimea regiono, ul. „Gagarina“ 3-17 — pri jago serĉas kontaktojn kun joganjoj.
Respondo garantiita.
ALEKSANDR TALIKOV (26-jara) — SU-198 205, Leningrad, ul. „Germana“ 37-67 — pri ĉt, kun ĉl.
La anoj de E-rondo „Krokodilaro“ (diversaĝaj gesamideanoj) dez. kor. pri ĉt, kun ĉl. Komuna adreso: SU-68610, Cukotka, p. Egvekinot, ab. jaŝĉik 22, Ivan Prisaĵnuk.

ENHAVO

- II Deklaracio pri Esperantismo (Oficiala teksto de la Bulonja Kongreso — 1905)
- 1 Esperanto — jarcento dual (Prof. Stojan Ĝuĝev)
- 2 El la parolado de d-ro L. L. Zamenhof en la Unua Universala Kongreso Esperantista
- 3 Kion Zamenhof skribis al Schleyer?
- 4 Kial ne Esperanto? (Edward Symoens)
- 6 Leipzig — urbo de la laborista E-movado (Ino Kolbe)
- 8 La centjara originala Esperanta poezio (Georgi Miĥalkov)
- 9 Poezio
- 10 Flugas niaj kantoj!.. (Andreo Roos)
- 11 Esperanto en radioj
- 12 Juna Esperantisto:
La perspektivo—praktika uzado (Maria Jan-kova); Internacia renkontiĝo (Nevjana Krăsteva)
- 14 Levŝki en ni mem. . . (Dimo Martinov)
- 15 Enlanda movado
- 16 El Sovetunio
- IV Poŝtmarkoj pri Esperanto

Sur la unua kovrilpaĝo:

La aŭtoro de Esperanto — D-ro L. L. Zamenhof.

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

Jurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (13. IV. 1987) aperigis artikolon pri la ekonomia agado de BEA; la sama (20. IV. 1987) aperigis detalan informon de la korespondanto de Bulgara Telegrafa Agentejo el Madrido pri la sukcesaj prezentoj de Bulgara Esperanto-Teatro en Madrido dum la nacia hispana Esperanto-Kongreso; en j. „Oteĉestven Front“ (13. IV. 1987) aperis triokolumna informo de Atanas Ilkov, speciala sendito de la redakcio, pri Esperantotur en u. Bydgoszcz, Pollando; la ilustrita semajna gazeto „Paraleli“ (7. V. 1987) sub titolo „Lumo en la lingva kaoso“ represas grandan artikolon pri Esperanto — esenco, historio, nuntempa stato, el gazeto „Smithsonian“, Vaŝingtono.

EN LA LANDO:

Jurnalo „Sumenska Zarja“ — u. Sumen (14. III. 1987) aperigis informon de Olga Gerasimova pri la aktivado de la kvin E-societoj en u. Sumen; en j. „Oteĉestven Glas“ — u. Plovdiv (9. V. 1987) aperis granda artikolo „Esperanto en Plovdiv“ de Krăstju Sofroniev; j. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca, aperigis informon de Bojĉo Mladenov pri la jubilea poŝtmarko „100 jarojn Esperanto“.

Ĉefredaktoro: Donĉo HITROV
Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.
Teknika arango: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan CALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldokvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

Filatelio

POSTMARKOJ PRI ESPERANTO

BULGARIO

La unua bulgara poŝtmarko kun Esperanto-subjekto estas eldonita en 1947 okaze de la 30-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Sofio. Tiu poŝtmarko estas ruĝbruna, kun valoro de 20-10 levoj. Ĝi prezentas la mapon de Bulgario, sur kiu videblas la kongresurbo Sofio kaj la esperanta stelo. Sur rubando estas presita teksto en Esperanto: „1887 Esperanto 1947 — 30 Jubilea Kongreso, 1947“.

La dua esperanta poŝtmarko aperis en 1957. Ĝi estas eldonita okaze de la 50-jara jubileo de Bulgara Esperanto-Asocio. Subjekto: Bildo de la kongresurbo Veliko Tŕrnovo kaj portreto de Zamenhof, esperanta teksto: „50 jaroj de Bulgara Esperanto Asocio — 70 jaroj de Esperanto“ — valoro 44 stotinkoj, koloro — grize-verda.

La trian esperantan poŝtmarkon oni eldonis en 1959, okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto. Ĝi prezentas portreton de Zamenhof kun teksto en Esperanto: supre „Zamenhof“; maldekstre „1859—1959“; dekstre — „Aŭtoro de Esperanto“, valoro — 1,25 levoj, koloro — malhele-verda.

Por memori la 35-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj oni repis la duan bulgaran esperantan poŝtmarkon, emisiitan en 1957, per bulgarlingva teksto: „XXXV Kongreso 1962“. La antaŭa valoro de 44 stotinkoj estis ŝanĝita je 13 stotinkoj. Fakte tiu ĉi poŝtmarko estas la kvara.

La kvina esperanta poŝtmarko aperis en 1963, okaze de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio. Subjekto: terglobo kun kvinpinta stelo, en kies mezo staras la litero „E“. En la maldekstra angulo, supre, estas la blazono de



Sofio. Teksto en Esperanto: 48-a Universala Kongreso de Esperanto, Sofio 3—10. VIII. 1963. Valoro — 13 stotinkoj; koloroj: bruna, grize-verda kaj helverda.

La sesa esperanta poŝtmarko aperis en 1978 okaze de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna, Bulgario. Valoro — 13 stotinkoj. Koloroj: verda, roza kaj ruĝa. Subjekto: vidaĵo de urbo Varna kaj de la Nigra Maro. Dekstre estas desegnita kvinpinta stelo, en kies mezo estas la litero

„E“. Teksto en Esperanto: 63-a Universala Kongreso de Esperanto, Varna 29.VII—5.VIII.1978.

La sepan poŝtmarkon oni eldonis en 1987 okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Sur ĝi estas prezentitaj portreto de Zamenhof, du hemisferoj kaj la jaroj 1887—1987. Valoro: 13 stotinkoj. Koloroj: flava, verda kaj nigra.

Nikolaj BOJAĜIEV,
Plovdiv



POLLANDO KAJ KUBO

Ankaŭ en tiuj landoj estis eldonitaj poŝtmarkoj dediĉitaj al la 100-jariĝo de Esperanto.



SURINAMO

La 4-an de februaro estis eldonita trimarko en honoro al la jubileo. La bildo montras la unuataĝan koverton kun stampo.

Ĉina Esperanto-Ligo lastatempe informis, ke aperos jubilea ĉina poŝtmarko la 26-an de julio 1987.

(El „Esperanto“ n-ro 3/1987)

